

abl. Esp. V-22419



# PEDAGOGIA REVUO

OFICIALA ORGANO  
DE TUTMONDA ASOCIO DE  
GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ  
T. A. G. E.



7-a JARO N-o 8

AUGUSTO 1928

## TARIFO DE LA ABONPREZOJ.

Landoj	Prezoj
Angla	ŝil. 4
Argentina	pes. or. 2
Aŭstria	ŝil. 5
Belga	belgoj 5
Brazila	milr. 5
Bulgara	lev. bulg. 100
Ĉeĥoslovaka	kron. ĉek. 25
Dana	kronoj d. 3
Estona	est. kr. 3
Finnlanda	mark. finl. 30
Franca	frankoj fr. 18
Germana	mark. or. 3
Greka	draĥmoj 54
Hispana	pesetoj 4,5
Hungara	kronoj or. 4
Itala	liroj ital. 15
Japana	jen. 1,5
Jugoslava	dinaroj 40
Litova	lid. 7,5
Latva	lat. 4
Nederlanda	gulden. 2
Norvega	kron. norv. 3
Pola	zlot. 6
Portugala	eskud. 15
Rumana	lev. rum. 150
Rusa	kop. oraj. 1,50
Sveda	kron. sv. 3
Svisa	frank. sv. 4
Usona	dolaro 1

Abonon por Int. Ped. Revuo sendu en nacia mono per registrita letero plejeble pere de via landa agento al la administrejo.

Membroj de la germana asocio sendu la kotizon (4.— M: 1.— M por la germ. asocio, kaj 3.—M por Int. Ped. Revuo) al ĝirokonto „Esperanto-Vereinigung deutscher Lehrer, Leipzig-Leutsch, No. 27.857“, membroj de la saksa asocio al k-go Schönherr, Dresden, ĝiro Dresden 30.560, poŝteko Dresden 112.617.

## ENKONDUKI

**Esperanton en la Lernejojn**  
praktike preparas Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Atentu tiun fakton kaj abonu  
**Internacian Pedagogian Revuon**

## AGENTOJ DE TAGE.

**Vian kotizon akceptas:**

### En Landoj

- Angla:** F-ino Kate Hancock, 172 Sackville Rd., Hove, Sussex.
- Aŭstra:** Josef Feder, Wien II/I, Erlafstr. 8/9.
- Belga:** Lab. Esp. Grupo, 24, rue de Sévigné-Anderlecht, Bruxelles. poŝt. 124.801.
- Blankrusa:** Agentejo Esperanto, D. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33.
- Bulgara:** Ivan Sarafov, Golemo-Selo, Kazanlika regiono.
- Ĉeĥoslovaka:** Albin Neužil, lernejestro, Olomouc-Neředin.
- Dana:** La Forta Voko, Dana Esperanto-Gazeto, Poŝtkonto: 3584. — S-ro Paul Neergaard, Kastelsvej 21, Kopenhago.
- Estona:** Agnes Dresen, Poska tanav 29-6, Tallinn.
- Finnlanda:** Pärnänen, Sulkava, Lieviska.
- Franca:** M. Boubou, 96 rue St. Marcéau, Orléans-Loiret.
- Germana:** Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer, ĝirokonto Leipzig-Leutsch No. 27857.
- Greka:** D-ro A. Stamatiadis, Rodou 21, Ateno.
- Hispana:** Ferd. Montserrat, str. Villarroel 107, 2a, 2a, Barcelona.
- Hungara:** Librejo de H. E. S. L. (Bleier Vilmos) Ujpest, Virag-utca 9.
- Japana:** Joshi H. Ishiguro, Tokio, Koojimachi P. O. Box 1.
- Java:** K. Wirjosaksono, Klaten.
- Jugoslava:** Svetislav S. Petrović, Pirot, Serbio, Novosádska 17.
- Litova:** A. Prapuolenis, mok., Kazluruda.
- Nederlanda:** P. Korte, Hoofd der School, Drieborg (GR).
- Pola:** K. Majorkiewicz, Czersk-Pom. poŝteka konto: PKO 202 100 (Poznan).
- Rumana:** Francisko Abel, Ineu, Jud. Arad.
- Rusa:** Centra Komitato de Sov. Esperant. Unio (SEU), poŝtkesto 630, Moskvo.
- Sveda:** Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm.
- Svisa:** S-ino N. Oumansky, 4 Petites Delices, Genevo.

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Redaktejo: HANS LUDWIG, Pirna-Posta IV-b (Germanujo)  
 Administrejo: M. GOLDBERG, Frohburgerstr. 68 p., Leipzig S 3 (Germ.),  
 poŝtekonto Leipzig 20 410 — Anoncoj: La linio, 3 mm alta, 6 cm larĝa, kosta 0,30 M.

## Esplorado pri vortofteco en Esperanto kaj en aliaj lingvoj\*)

de Henrikinio D anneil.

**Enkonduko.** — Esperanto estas instruata kaj lernata en la tuta mondo. Estas sendube, ke Esperanto estas multe pli facila ol ĉiu nacia lingvo. Sed ankaŭ sendube estas, ke ĝi ne estas egale facila por ĉiuj nacioj, por ĉiuj medioj aŭ sociaj klasoj, kaj por ĉiu aĝo. Estus utile kompari tiujn diferencojn, sekvante la lernadon en diversaj sferoj. Se oni povus precize scii, kigrade kaj kiamaniere tiuj diversaj kaŭzoj influas lernadon de Esperanto, oni kapablus, multe pli bone ol oni faris ĝis nun, adapti taŭgan instru-metodon al specialaj kondiĉoj kaj tiel plirapidigi lernadon de Esperanto.

IALA (International Auxiliary Language Association in the United States, Incorporated), kies sidejo estas en New York, kaj Instituto J. J. Rousseau, en Ĝenevo, entreprenis kune objektivan kontrolon de Esperanto-instruado kaj komparon de la rapideco, je kiu Esperanto kaj aliaj lingvoj estas lernataj. Ili opiniis oportune, komenci la laboron per esploro de la nomita kampo, uzante por tio la metodon de testoj, t. e. de precizaj ekzamenoj faritaj en difinitaj kondiĉoj, sur bazo de science ellaborita demandaro. Tiaj testoj celas mezuri la diversajn ŝtupojn, la progresojn dum lernado. Ili montros, ĉu kaj kiom gepatra lingvo, kono de aliaj lingvoj, grado de ĝenerala instruo, aĝo, labora kaj familia medio, ja eĉ raso kaj geografia malsameco konstateble influas kapablon lerni Esperanton — En nia kazo, tiu testo-metodo ŝajnas al ni plej taŭga, ĉar ĝi permesas kontrolon, komparon faratajn en unu centro, laŭ la ricevitaj folioj, ne necesigante personajn rilatojn inter centro kaj instruantoj aŭ lernantoj. Ĉar tiuj ĉi estas en la plej diversaj lokoj de la terĝlobo, tia avantaĝo estas grava.

Ni esperas, ke la ĝisnuna laboro, ĉi-sube priskribita, eble povos esti helpilo por instruistoj, kursgvidantoj kaj verkontoj de lernolibroj.

**Netaŭgeco de naciaj testoj por nia celo.** — Kiam Instituto J. J. Rousseau, kiu havas i. a. la specialan taskon aplikigi tiajn testojn, ricevis el

\*) Tiu ĉi esplorado estis ebligita per subvencio de IALA, al kiu ni esprimas nian sinceran dankon.

Usono la proponon uzi esperantajn tradukojn de testoj uzataj por ekzamenoj en angla lingvo, ĝi rimarkis, ke tiaj testoj tute ne taŭgas por nia celo. Ili ne estas gradigitaj laŭ la bezonoj de nia eksperimento; ili prezentas vortojn, kiujn infanoj konas en sia gepatra lingvo, sed kiujn oni ne lernas en la unuaj fremdlingvaj lecionoj. Ili ankaŭ ne estas sufiĉe internaciaj laŭ enhavo, pritraktante temojn tro specialajn, kiel ekzemple usonajn kutimojn, ne konataj de alilandanoj. Estis do necese, verki aliajn testojn, konstruotajn sur nova bazo.

**Esploro de lernolibroj por starigo de internaciaj testoj.** — Por fari internaciajn testojn, ŝajnas necese, scii laŭ kiuj metodoj kaj lernolibroj oni instruas Esperanton diverslande. Pro tio ni skribis al instruantoj diversnaciaj, kaj ricevis respondojn el 16 landoj. En kelkaj landoj estas nur unu libro, kiu estas plej ĝenerale uzata, en aliaj du aŭ pli. Konforme al la sciigoj, kiujn ni ricevis kaj kiujn ni ĉerpis el diversaj partoj de ĉiu lando por havi plej senpartian rezulton, ni studadis 29 lernolibrojn: 28 naciajn kaj la „Fundamenton“, kiu estas uzata en kelkaj regionoj.

Jen la listo de naciaj libroj:

en angla	lingvo,	lernolibroj de:	Butler, Fryer, Benson (Usona);
„ bulgara	„	„	Atanasov;
„ ĉeĥa	„	„	Ŝilha, Ŝupichova;
„ dana	„	„	Skeel-Giorling, Zoffmann;
„ franca	„	„	Cart, Grosjean-Maupin, Privat, Rosiaux & Bonnehon; libreto de „Librairie centrale“; Cours rationnel, eldonita de „Fédération espérantiste ouvrière“;
„ germana	„	„	Borel, Möbusz, Otto, Schamanek, Streidt;
„ hispana	„	„	Inglada & López Villanueva;
„ holanda	„	„	Blok;
„ itala	„	„	Migliorini, Stromboli;
„ pola	„	„	Turno;
„ rumana	„	„	Kimel;
„ rusa	„	„	Lydin, Sakaroff;
„ sveda	„	„	Jansson.

La celo estis do scii, ĉu la vortoj uzataj en lernolibroj por elementaj kursoj estas samaj en diversaj landoj, ĉu la lecionoj estas same gradigitaj, k. t. p., ĉar la rezulto devas liveri la materialon uzotan en internaciaj testoj. Tiu studado montris al ni, kia anarkia stato regas en la elekto de vortoj por lernolibroj.

Por faciligi komparon, ni partigis ĉiun libron je 15 partoj. Ni ne povis partigi laŭ libraj lecionoj aŭ ĉapitroj, ĉar la nombro da tiaj ne estas sama en ĉiu lernolibro. 15 estis la plej taŭga nombro, ĉar pluraj libroj enhavas 15 lecionojn; unu havas 45, do facile dividebla je 15; pli malpli facile kaj kiel eble laŭsence, ni partigis la aliajn. Nur mallongajn libretojn en 10 lecionoj ni ne partigis, sed konsideris tiujn 10 lecionojn kiel la 10 unuajn partojn.

Poste ni faris unue tabelon, kiu enhavas la ĉefajn gramatikajn regulojn kaj la afiksojn aperantajn en ĉiu parto; due liston de ĉiuj radikoj uzataj en la libroj, skribante apud ĉiu vorto, en kiu parto de ĉiu libro ĝi aperis unuafoje.

Entute ni trovis tiamaniere proksimume 3.250 vortojn. — Interese estas scii, ke la vortaro de BOIRAC, Esperanto-Esperanta enhavas ĉirkaŭ 11.500 vortojn.

**Malsameco de lernolibroj.** — Havante antaŭ si tiujn 3.250 radikojn ĉerpitajn el 29 lernolibroj, oni unuamomente supozas, ke oni havas grandan trezoron por starigi vere internaciajn testojn. Studinte pli atente, oni troviĝas en granda embaraso! La malsameco de la vortoj uzitaj en la diversaj lernolibroj montras ke tiuj estas faritaj laŭ tute diversaj metodoj, kelkafoje eĉ, ŝajnas, sen metodo.

Entute estas 91 radikoj, kiuj troviĝas en ĉiuj lernolibroj, kaj ne ekzistas eĉ unu vorto, kiu aperas en ĉiuj libroj en la unua parto! Esti aperas en du libroj en la dua leciono, en ĉiuj aliaj en la unua. La artikolon la ni trovas en la dua leciono de unu libro kaj en la kvara de alia; en ĉiuj aliaj en laŭ una. Kaj tiuj du vortoj estas la plej perfektaj en tiu rilato.

**Kie** troviĝas en preskaŭ ĉiuj libroj en unu el la 3 unuaj partoj; tamen, en 3 libroj ĝi aperas nur en la respektive 7-a, 9-a kaj 10-a. La radikon long ni trovas en unu libro en la 15-a, en alia en la 12-a, en ĉiuj aliaj en la 6 unuaj partoj.

Kaj plej uzataj vortoj kiel: diri, ankaŭ, danki, fini, frukto, ĝis, horo, jes, kosti, meti, nun, nur, pano, sed, tranĉi, varma — mankas en unu aŭ pluraj libroj.

Simila malsameco montriĝas, kiam oni rigardas la afiksojn: laŭ la libro ni trovas: mal en la 1-a, 2-a, 3-a, 4-a, 5-a aŭ 14-a parto; aĵ en la 2-a, 3-a; 4-a, 7-a, 8-a, 9-a, 10-a, 11-a, 12-a, 13-a aŭ 14-a parto; in en la 8 unuaj kaj 11-a partoj.

Tiuj diferencoj venas nur malgrandparte de malsameco de naciaj lingvoj. Oni povus supozi, ke aŭtoroj generale klopodas prezenti en la lecionoj vortojn similajn al gepatra lingvo de lernantoj. Sed sperto montras, ke tio efektiviĝas nur en malmultaj kazoj. Ŝajnas, ke la diferenco estas kaŭzata ĉefe de la ekzercoj elektitaj de aŭtoroj. Kelkaj elektas „klasikajn“ tekstojn, kiuj enkondukas, jam de komenco, sufiĉe maloftajn vortojn. — Aliaj elektas ian temon, kaj traktas ĝin tre detale; tio ankaŭ alvenigas vortojn ne ofte uzatajn; tiel oni trovas, ekzemple, en sama libro: orfo, vidvo jam en unua leciono; apro, ŝakalo en dua; arterio en tria, dum kiam lakto venas nur en 6-a, afero en 9-a, kaj adresio en 15-a. — Aliaj aŭtoroj apartigas vortojn laŭ elparolo. Do troviĝas en sama leciono plej diversaj vortoj — laŭ senco — ĉar ili estas similaj laŭ elparolo.

**Starigo de internaciaj testoj laŭ uzataj lernolibroj.** — Tre malfacile estas, starigi testojn sur tia divers„oza“ bazo. Oni devas elekti vortojn laŭ la graveco de l' diversaj lernolibroj, kaj laŭ la ofteco de ilia praktika uzado; ĉar certe estas, ke instruanto, kiu uzas unu el la vortmalriĉaj libroj, lernigas al siaj lernantoj aliajn vortojn dum lecionoj.

Sperto montris do, ke estas tute neeble starigi testojn, kiuj enhavas vortojn konatajn de ĉiuj lernantoj post sama nombro la lecionoj. Sed, se oni ne povas fari tion kun matematika precizeco, oni tamen povas akiri altan gradon da egaleco, rilate al la malfacilaĵoj, kiujn oni prezentas al la lernantoj per testoj.

Por pravi tion, ni ekzameniu la unue proponitajn testojn, tradukitajn el angla lingvo. En la unua alineo, ni trovas la vortojn: vulpo, sciuro, serpento, kuniklo.

Preninta nian liston, ni vidas, ke kuniklo estas uzata nur de unu sola lerno-libro en ĝia unua parto. Ĝi aperas poste:

en 1 libro	en ĝia	2-a parto	
„ 1	„ „	„ 3-a	„
„ 1	„ „	„ 6-a	„
„ 1	„ „	„ 7-a	„
„ 1	„ „	„ 8-a	„

En la aliaj 23 libroj ĝi tute ne aperas.

Aplikante la ekzemplon praktike, ni do vidas, ke, el 29 ekzamenatoj (supozante ke ĉiu uzis unu el niaj libroj kaj neniu konis vortojn el alia fonto ol la libro) nur unu povus respondi la demandon; 5 povus ĝin respondi post pliaj lecionoj, kaj 23 tute ne kapablis respondi ĝin. — Ankoraŭ pli grava estas la afero pri vorto sciuro, kiu estas uzata nur en 2 lernolibroj: do 27 el 29 lernantoj ne komprenus la demandon.

Se ni faras la kontraŭon, kaj elektas teston laŭ la listo, ni vidas, ke se ni uzas, ekzemple, la vorton *birdo* (por resti en sama arbara atmosfero), el la 28 lernantoj nur 2 neniam renkontis tiun vorton; el la 27 aliaj

11 renkontis ĝin en	1-a parto
9	„ „ 2-a „
1	„ „ 3-a „
2	„ „ 4-a „
1	„ „ 5-a „
1	„ „ 7-a „
1	„ „ 8-a „
1	„ „ 9-a „

Certe, testoj ne devas esti tro facilaj, sed, por nia celo, ili devas esti laŭeble egalaj por ĉiuj landanoj, kaj tiun (nur relativan, tion ni scias) egalecon oni atingas nur, se oni faras testojn, atentinte ĉiujn diverslandajn lernolibrojn, aŭ almenaŭ la plej uzatajn.

Ni klopodis esti kiel eble plej objektivaj starigante novajn testojn sur lernolibra bazo. Ni faris 4 diversajn testojn.

La unua testo, prezentota al la lernantoj komence de la unua leciono, estas sendependa de lernolibroj; ĝi celas montri, kiom oni povas diveni, eĉ antaŭ ol lerni ion.

La dua testo enhavas laŭeble la vortojn aperantajn en la 5 unuaj partoj de almenaŭ 23 lernolibroj.

La tria testo, sammaniere enhavas vortojn aperantajn en la 10 unuaj partoj; la kvara testo, vortojn aperantajn en la 15 partoj.

Sur nia ĉi-suba listo, ni metis apud la literon L (= el lernolibroj) ciferon, kiu indikas, en kiu testo ni povas uzi la vorton. Ekzemple: aĉet L3, signifas, ke la radiko *aĉet* aperis en la plej multaj libroj en la 6—10-a lecionoj, do en la dua parto, kiu liveras la vortojn por testo 3-a.

**Komparo de vortofteco en diversaj lingvoj.** — Oni rimarkas, kaj la unuaj de ni uzitaj testoj akcentas tiun fakton, ke vortoj, konataj de ĉiu homo, eĉ de infano, en gepatra lingvo — ĉar uzataj en ĉiutaga vivo — ne estas konataj de Esperanto-lernantoj, kiuj ne lernas la lingvon per bezonoj de vivo, sed nur dum lecionoj, ĉefe per, aŭ almenaŭ laŭ libroj. La konata esperanta vortaro estas do tute alia, ol tiu de gepatra lingvo; la plej komunajn vortojn ofte ne konas eĉ bonaj esperantistoj — ĉar ili neniam vivis en Esperantlando.

Kiam oni instruas Esperanton aŭ verkas lernolibron, oni devas atenti la celon, kiun deziras atingi la lernantoj. Pro tio ekzistas ja fakaj lernolibroj, enhavantaj vortojn speciale utilajn por ia celo: komerco, turismo, scienco, k. t. p. Sed, por ĝenerala uzo de Esperanto, ŝajnas ke, ĝis ia grado, oni bezonas koni la samajn vortojn, kiujn oni konas en gepatra lingvo. Por instrui Esperanton aŭ verki lernolibron, estus do tre utile scii, kiuj vortoj estas plej ofte uzataj en naciaj lingvoj; kaj por nia speciala celo, estas interese scii, ĉu oftaj vortoj en naciaj lingvoj respondas al la vortoj troviĝantaj en lernolibroj.

Ni faris tiun komparon tiamaniere: -

Unue ni starigis liston konsistantan el ĉiuj vortoj (radikoj kaj helpaj elementoj) kiuj troviĝas en almenaŭ 23 el la 29 studitaj Esperanto-lernolibroj (do en ĉirkaŭ 80%) ; ni havis tiamaniere 431 vortojn.

Poste ni faris 3 listojn (francan, anglan, germanan) enhavantajn la 431 plej ofte uzatajn vortojn en la franca, angla kaj germana lingvoj.

Por starigi tiujn listojn, ni konsultis 3 librojn pri vortofteco. La francajn vortojn ni prenis el la usona libro de Henmon, titolita: „A French Word Book based on a count of 400.000 running words“ (Franca vortolibro bazita sur 400.000 vortoj el sinsekvaj tekstoj), eldonita de l' Universitato de Wisconsin (sept. 1924).

La vortoj de tiu libro estas ĉerpitaj el diversaj fontoj, el:

Tekstoj eldonitaj por lerneja uzo	80.000	vortoj
Filozofa prozo	20.000	„
Gazetaj artikoloj	50.000	„
Jurnalaj artikoloj kaj rakontoj	30.000	„
Modernaj francaj aŭtoroj	140.000	„
Poeziaĵoj	15.000	„
Politikaj kaj militistaj artikoloj	25.000	„
Leteroj kaj telegramoj	15.000	„
Popolaj fabeloj	25.000	„
	<hr/>	
Entute	400.000	vortoj.

Tiu nombro da vortoj entenas 9.187 diversajn vortojn (laŭ vortara maniero). El tiuj, 3.905 aperis almenaŭ 5-foje; ili estas konsiderataj kiel oftaj vortoj kaj formas la enhavon de la libro. El ili ni do eltiris la 431 plej oftajn.

La anglajn vortojn liveris „The Teacher's Word Book“ (La vortolibro de l'Instruisto) de Edward L. THORNDIKE, Teachers College, Columbia University, New York, 1921. Tiu libro enhavas 10.000 oftajn vortojn ĉerpitajn el precizaj fakoj: jen la suma nombro da vortoj de ĉiu fako:

Porinfana literaturo	625.000	vortoj
Biblio kaj anglaj klasikaj verkoj	3.000	„
Lernejaj lernolibroj	300.000	„
Libroj pri kuirado, kudro, agrikulturo, komerco, k. t. p.	50.000	„
Jurnaloj	90.000	„
Korespondado	500.000	„
	<hr/>	
Sumo	1,668.000	vortoj

En germana lingvo ni eltiris la vortojn el la verko de F. W. KAEDING: „Häufigkeitwörterbuch der deutschen Sprache“ (Ofteca vortaro de germana lingvo), Steglitz apud Berlin, 1897. La vortoj enhavataj en tiu libro estas ĉerpitaj el:

Diversaĵoj	4,806.253	vortoj
Juro	400.000	"
Teologio	400.000	"
Medicino	100.000	"
Komerco	300.000	"
Historio	600.000	"
Klasikaĵoj	2,000.000	"
Leteroj: a) komercaj	100.000	"
b) militistaj	200.000	"
c) privataj	700.000	"
Parlamento	900.000	"
Libro pri Eltrovoj	400.000	"
Ĝeneralaj militaĵoj	600.000	"
<hr/>		
Sumo		10.906.236 vortoj

Komparante nian esperantan liston kun la 3 nacilingvaj, ni konstatis, ke 199 vortoj starigas samtempe sur nia listo kaj sur la tri aliaj. Estas sur nia esperanta listo 257 vortoj al kiuj respondas unu aŭ kelkaj vortoj de la franca listo; Estas sur nia esperanta listo 296 vortoj al kiuj respondas unu aŭ kelkaj vortoj de la angla listo; Estas sur nia esperanta listo 274 vortoj al kiuj respondas unu aŭ kelkaj vortoj de la germana listo.

Estas sur la esperanta listo 174 vortoj kiuj mankas sur la franca,  
                                   135 " " " " " angla,  
                                   kaj 157 " " " " " germana listoj.

Kontraŭe: Staras sur la franca listo 93 vortoj kiuj mankas sur la esperanta,  
                                   " " angla " 83 " " " " " "  
                                   kaj " " germana " 109 " " " " " "

Ĉi tie ŝajnas esti kalkuleraro, ĉar sur nacilingva listo la sumo de la vortoj respondantaj al la esperantaj kaj tiuj mankantaj en Esperanto ne estas 431, la sumo de ĉiuj vortoj. La kialo de tiu diferenco estas, ke, en nacia lingvo estas ofte pluraj vortoj kiuj estas tradukataj en Esperanto nur per unu radiko. Ekzemple al la radiko „hom“ respondas sur franca listo „homme“ + „humain“; sur angla „people“ + „man“ + „person“, sur la germana „Mensch“ + „Leute“. —

La franca listo tradukita liveras	350	esperantajn radikojn,
" angla " " "	379	" "
" germana " " "	383	" "

75 vortoj (17<sup>0</sup>/<sub>10</sub> de la tuto) staras sur nia esperanta listo kaj mankas sur la tri aliaj.

Kontraŭe 29 vortoj (6,7<sup>0</sup>/<sub>10</sub>) staras sur la tri nacilingvaj listoj kaj mankas sur la esperanta.

Entute mankas proksimume 200 esperantaj vortoj por havi ĉiujn vortojn kiuj staras sur unu, du aŭ la tri nacilingvaj listoj, do vortoj troviĝantaj inter la 431 plej oftaj vortoj en franca, angla aŭ germana lingvo, aŭ en du aŭ tri lingvoj samtempe.

Plej grandan similecon havas la esperanta listo kun la angla.

Tiu malsimileco ne signifas ke, por fari taŭgan lernolibron, oni devus nepre kaj nur uzi la vortojn plej ofte uzatajn en aliaj lingvoj. Certe estus bone, se oni povus aldoni parton de la mankantaj vortoj, almenaŭ la 29



vortojn troviĝantajn sur ĉiuj nacilingvaj listoj; kelkaj el ili estas tiom ofte uzataj, ke oni ne komprenas, kiel ili povas manki en esperantaj lernolibroj; ekzemple: part, sekv, kamp, form, sol, plen, halt, perd, preskaŭ, tie, tiam, k. t. p. Sed kontraŭe, iu nombro da vortoj troviĝantaj sur la esperanto-listo kaj ne sur la aliaj nepre devas resti, ĉar, se ili ne estas tre ofte uzataj, oni tamen devas, pro ia kaŭzo, koni ilin post elementa kurso; ili estas necesaj al nova esperantisto, aŭ utilaj al gramatikaj klarigoj, aŭ al lernado de vortfarado; aŭ ili estas tiaj, kiajn oni uzas dum lecionoj; ekzemple: nomoj de monatoj, de tagoj, nombroj, vortoj kiel: leciono, lingvo, metro, plumo, pomo, diligenta, kuraci, saluti.

Resume oni rimarkas, ke ĉirkaŭ 46<sup>0</sup>/<sub>10</sub> de la vortoj de nia esperanta lernolibra listo akordiĝas kun la vortofteco de trinaciaj lingvoj. Proksimume 17<sup>0</sup>/<sub>10</sub> el la lernolibraj vortoj en neniu el la tri naciaj lingvoj estas oftaj vortoj. La resto, 37<sup>0</sup>/<sub>10</sub>, estas oftaj en unu aŭ du naciaj lingvoj (franca, angla, germana).

**Vortofteco en esperantaj tekstoj.** — Poste ni faris alian interesan komparon. En Sennacieca Revuo (numero de Julio-Septembro 1927) aperis artikolo de S. RUBLEV: „Provo de kvanta element-analizo de la lingvo esperanto“. Tiu artikolo klarigas esploron pri vortofteco en Esperanto. S-ro Rublev analizis 3 numerojn de la gazeto „Sennaciulo“ kaj 3 librojn: „ABC de Sennaciismo“ de V. ELSUDO (originalo), „Patro kaj filoj“ de TURGENEV (traduko de KABE), „En malliberejo“ de Ĉirikov (traduko de KABE).

Tiuj skribaĵoj liveris ĉirkaŭ 100.000 vortojn — radikajn kaj helpajn elementojn, el kiuj 235 (ni dekalkulis la afiksojn por havi la saman bazon kiam ni uzis por nia listo) estas konsiderataj kiel oftaj.

El tiu listo estas 187 vortoj kiuj troviĝas ankaŭ sur la lernolibra esperanta listo, kaj 48 kiuj mankas sur ĝi. Do el la Rublev-a listo, t. e. esperanta ofteco, proksimume 80<sup>0</sup>/<sub>10</sub> el la oftaj vortoj akordiĝas kun la lernolibra listo, kaj 20<sup>0</sup>/<sub>10</sub> mankas sur nia listo.

Ni ne povas fari kontraŭan provon, ĉar la sumo da vortoj ne estas sama.

**Vortokono de infanoj.** — Fine, ni uzis laboraĵon de D-ro D. A. Prescott, de Instituto J. J. Rousseau, kiu, por alia celo, faris en Ĝenevo enketon pri vortokono ĉe infanoj. 104 infanoj (52 knaboj kaj 52 knabinoj) 10—11-jaraj, sama nombro 11—12, 12—13, 13—14-jaraj, do entute 416 infanoj el publika lernejo havis taskon, skribi dum ¼ da horo ĉiujn vortojn (en gepatra franca lingvo), kiuj trapasis sinsekve ilian cerbon. D-ro Prescott starigis listojn enhavantajn ĉiujn tiujn vortojn; li aldonis apud ĉiu vorto, kiam da fojoj ĝi estas menciita de l' infanoj.

Tiel starigita listo ne informas pri kompleta vortaro konata de infanoj. Sed, se unufanke la infanoj estas influataj de la medio en kiu ili estas, kiam ili skribas, — de momenta priokupo, projekto aŭ travivaĵo, — aliflanke la fakto, ke ni konsideris ĉi tie kiel oftajn nur la vortojn skribitajn de almenaŭ 29 infanoj, garantias pri efektiva ofteco. El tiu listo ni ree elĉerpis la 431 plej oftajn vortojn, kaj komparis ilin kun nia esperanta listo.

Estas sur nia listo 136 vortoj al kiuj respondas unu aŭ kelkaj vortoj de tiu infana listo;

estas sur la infana listo 261 vortoj kiuj mankas sur la esperanta.

Ni vidas do, ke nia listo diferenciĝas de la infana pli ol de ĉiu alia. Tio estas kaŭzita ĉefe de tio, ke infanoj skribis precipe substantivojn, verbojn, adjektivojn, forlasante prepoziciojn kaj aliajn helpajn elementojn, kiuj troviĝas sur ĉiu alia listo.

Interese estas, atenti ankaŭ la datojn: la libro pri vortofteco de Kaeding aperis en 1897. La listo de la infanoj montras kiel, 30 jarojn poste, aliaj vortoj nomantaj novajn eltrovaĵojn iĝis tute kutimaj, eĉ por infanoj; ekzemple: aŭtomobilo, elektro, kinematografo, motociklo.

Sintezante nian laboron, ni faris liston da vortoj enhavantan:

1. la vortojn de la lernolibra listo;
2. la vortojn oftajn en franca, angla kaj germana lingvoj (laŭ Henmon, Thorndike kaj Kaeding);
3. la vortojn oftajn en Esperanto (laŭ Rublev);
4. la vortojn oftajn en la listo liverita de infanoj (laŭ Prescott).

Tiu listo enhavas 876 vortojn. Apud ĉiu vorto estas literoj, kiuj indikas kie troviĝas la vorto.

### Listo da Vortoj.

L = el esperanto-lernolibroj.  
 F = el franca ofteco-listo.  
 A = el angla ofteco-listo.  
 G = el germana ofteco-listo.  
 R = el esperanto-listo de Rublev.  
 I = el listo liverita de infanoj.

abel					I	aper		F	A	G	R	
abi					I	apog						I
abrikot					I	april	L. 3					
aĉet	L. 3		A	G		apud	L. 3	F	A	G		
aer	L. 4	F	A	G		arb	L. 2		A			I
afabl					I	ardez						I
afer	L. 3	F	A	G	R	arĝent			A			I
ag	L. 4	F	A	G		arme		F	A	G		
agl					I	art			A	G	R	
agrabl	L. 4					atend	L. 4	F	A	G		
aĝ			A			atent	L. 3		A			
ajn	L. 4		A	G		ating	L. 4		A	G		
akcept	L. 1	F	A			aŭ	L. 3	F	A	G	R	
akv	L. 3	F	A	G		aŭd	L. 3	F	A	G		
al	L. 2	F	A	G	R	aŭgust	L. 4					
ali	L. 3	F	A	G	R	aŭskult	L. 4	F				
alt	L. 3	F	A	G	R	aŭtomobil						I
am	L. 2	F	A	G	R	aŭtun	L. 4					
amas				G		av	L. 3					I
ambaŭ			A	G		avel						I
amik	L. 2	F	A	G	R	azen						I
anas					I	babel	L. 4		A			
anser					I	baldaŭ	L. 3	F	A	G		
anim		F		G		banan						I
ankaŭ	L. 2	F	A	G	R	bank			A	G		
ankoraŭ	L. 3	F	A	G	R	bar						I
anstataŭ	L. 4			G		bat	L. 4	F		G		
antaŭ	L. 3	F	A	G	R	batal				G	R	
apart					R	bedaŭr				G		
aparten	L. 4					bek						I

bel	L. 2	F	A	G	R	I	dank	L. 3		A	G	
benk			A	G		I	daŭr	L. 3	F			
ber						I	de	L. 2	F	A	G	R
best	L. 3	F	A			I	decembr	L. 3				
bezon	L. 3	F	A	G			decimetr					
bicikl						I	dek	L. 3	F	A	G	R
bild		F		G		I	dekstr			A		
bird	L. 2		A			I	demand	L. 3	F	A	G	R
blank	L. 3	F	A			I	dent	L. 3				
bløv			A				denunc					
blu						I	des				G	
bluz						I	desegn					
bol						I	dev	L. 2	F	A	G	R
bombon						I	dezir	L. 2		A	G	R
bon	L. 2	F	A	G	R	I	Di		F	A	G	
botel						I	dik		F			
bov	L. 3					I	diligent	L. 3				
brak		F				I	dimanĉ	L. 4				
branĉ						I	dir	L. 2	F	A	G	R
brasik						I	direkt			A	G	
brav		F					direktor					
bril	L. 4			G			divers	L. 4			G	R
bros						I	do	L. 3	F	A	G	R
bru		F					doktor					
brul	L. 3		A				dom	L. 2	F	A	G	
brun						I	don	L. 2	F	A	G	R
buĉ						I	dorm	L. 2	F	A		
burg					R		drap					
buŝ	L. 3					I	du	L. 2	F	A	G	R
buter						I	dum	L. 3	F	A	G	R
butik						I	eĉ	L. 3	F	A	G	R
buton						I	edz	L. 3	F			
cel				G	R		efektiv					R
cent	L. 3	F	A	G	R		efik		F			
cert	L. 3	A	A	G			egal				G	
ci	L. 2	F		G			ekonomi					R
cifer						I	ekster	L. 4	F	A	G	
cigar	L. 4						ekzempl		F		G	
cirkel						I	ekzist					R
ĉambr	L. 2	F	A	G	R	I	el	L. 2		A	G	R
ĉapel	L. 3					I	elefant					
ĉar (kunjunkcio)	L. 2	F	A	G	R	I	elekt				G	
ĉar ... (o)						I	elektr					
ĉe	L. 2	F		G	R		'en	L. 2	F	A	G	R
ĉef		F			R		episkop		F			
ĉel		F					esper	L. 3		A	G	
ĉemiz						I	est	L. 2	F	A	G	R
ĉeriz						I	estim	L. 4			G	
ĉeval	L. 3	F	A			I	estrad					
ĉi	L. 3	F	A	G	R		etaĝ			A		
ĉia	L. 4	F	A				facil	L. 3		A	G	R
ĉiam	L. 3	F	A	G	R		faden					
ĉie	L. 4	F					fajr	L. 4		A	G	R
ĉiel	L. 4						fak					
ĉiel ... (o)		F		G		I	fakt					
ĉies	L. 4						fal	L. 3	F	A	G	
ĉifon						I	famili	L. 2	F	A		
ĉio	L. 3	F	A	G	R		far	L. 2	F	A	G	R
ĉirkaŭ	L. 3	F	A	G			farm		F			
ĉiu	L. 3	F	A	G	R		farun					
ĉokolad						I	fasad			A		
ĉu	L. 2	F	A	G	R		fasad	L. 3				
da	L. 3	F	A	G	R		feliĉ	L. 2	F	A	G	R

fenestr	L. 3	A		I	histori					I
fer	L. 4		G	I	hodiaũ	L. 3	F	A	G	
ferm	L. 4	F	A	G	hom	L. 2	F	A	G	R
fil	L. 2	F	A	G	honor		F	A	G	
fin	L. 3	F	A	G	hor	L. 3	F	A	G	
fingr	L. 4				horloĝ	L. 3				I
firm			G	I	hund	L. 2				I
fiŝ					ia	L. 4				
flank		F	A	G	ial	L. 4		A	G	
flav					iam	L. 3		A	G	
flor	L. 3				ide	L. 4	F			
flug	L. 3		A		ie	L. 4		A	G	
foj	L. 3	F	A	G	iel	L. 4		A	G	
foli					ies	L. 4		A	G	
for	L. 3		A	G	ili	L. 2	F	A	G	R
forĝes	L. 3	F			imperi		F		G	
fork					impost				G	
form		F	A	G	impres		F			
forn					infan	L. 2	F	A	G	R
fort	L. 3	F	A	G	ink					I
Franc	L. 3				instinkt		F			
frank		F			instru	L. 3			G	I
frat	L. 2		A		inteligent		F			
fraũl	L. 3		A		intenc	L. 4				
fraz				G	inter	L. 3	F	A	G	R
fring					interes				G	R
fromaĝ					io	L. 3		A	G	
front			A		iom	L. 4		A	G	R
fru	L. 3	F	A	G	ir	L. 2	F	A	G	R
frukt	L. 4				iu	L. 3		A	G	R
fund		F		G	jak					I
funkci		F			jam	L. 3	F	A	G	R
ĝaj	L. 3			G	januar	L. 3				I
ĝajn		F			jar	L. 3	F	A	G	R
gas					je	L. 3	F	A	G	R
gazet					jen	L. 3	F	A	G	R
genu				R	jes	L. 2	F		G	
geografi					ju				G	
geometri					juĝ	L. 4			G	
german				G	juli	L. 3				
glas	L. 3				jun	L. 3	F	A	G	R
gramatik					jup					I
grand	L. 2	F	A	G	just			A		
grav				R	juvel					I
gravur					jaud					I
gren			A		jet	L. 4	F			
griz					jus	L. 4			G	
gum					kadr					I
garden	L. 2		A		kaf	L. 3				I
general		F			kaj	L. 2	F	A	G	R
ĝi	L. 2	F	A	G	kajer	L. 3				I
ĝis	L. 2	F	A	G	kalendar					I
ĝoj	L. 3	F	A	G	kalkul				G	I
ĝust			A		kamarad					R
har	L. 3				kamen					I
hav	L. 2	F	A	G	kamp		F	A	G	R
halt		F	A	G	kanap					I
hejm	L. 4		A	G	kandel	L. 4				
hejt					kanon					I
help	L. 3	F	A	G	kant	L. 2	F	A		I
herb	L. 4				kanton					I
hierau	L. 3			G	kap	L. 3		A	G	R
hirund					kapabl		F			R

kapital					R	
kapitan		F				I
kapr						I
kapt	L. 4		A	G		I
kar	L. 3	F	A			
karakter		F				
karb						I
karot						I
kart						I
karton						I
kaserol						I
kastel						I
kat	L. 2					I
katen						I
kaüz		F	A			
ke	L. 3	F	A	G	R	
kel						I
kelk	L. 3	F	A	G	R	
kest						I
kia	L. 3	F	A	G	R	
kial	L. 3	F	A	G	R	
kiam	L. 3	F	A	G	R	
kie	L. 2	F	A	G	R	
kiel	L. 3	F	A	G	R	
kies	L. 4			G		
kinematograf						I
kio	L. 2	F	A	G	R	
kiom	L. 3	F	A	G		
kitel						I
kiu	L. 2	F	A	G	R	
klar	L. 4		A	G	R	
klas					R	I
knab	L. 2		A			I
kok	L. 3					I
kol	L. 4					I
koler	L. 3					
kolor			A			I
komb						I
komenc	L. 3	F	A		R	
komerc	L. 4			G		
komod						I
kompren	L. 3	F			R	
komun				G	R	
kon	L. 3	F	A	G	R	
kondiĉ					R	
konduk	L. 4	F		G		
kongres					R	
konscienc		F				
konserv		F				
konsil	L. 4			G		
konsist	L. 3			G		
konstru	L. 4			G		
kontraŭ	L. 3	F	A	G	R	
kor	L. 3	F	A	G	R	
korb			A			I
koridor						I
kork						I
corp		F	A	G		I
korpus				G		
kort				G		I
koton						I
kost	L. 3			G		
kovr			A			I

krajon						I
kran						I
kravat						I
kre					G	
kred	L. 4	F	A	G	R	
kresk	L. 3		A			
kret						I
kri	L. 4	F			R	
kroĉ						I
krom	L. 4			G		
kruc			A			
krur						I
kudr						I
kuf						I
kuir	L. 3					I
kuk						I
kuler						I
kulp						
kun	L. 2	F	A	G	R	
kunikl						I
kur	L. 3	F		G		I
kurac	L. 4					
kurag				G		
kurten						I
kuŝ	L. 3	F	A	G		
kuz	L. 3					
kvadrat						I
kvankam	L. 4		A	G		
kvant			A			
kvar	L. 3	F	A	G	R	
kverk						I
kvin	L. 3	F	A	G	R	
la	L. 2	F	A	G	R	
labor	L. 2	A	A	G	R	
laĉ						I
lac	L. 4					
lag						I
lakt	L. 4		A			I
lamp						I
lan						I
land	L. 3	F	A	G	R	
lang						I
larg				A		
las	L. 4	F	A	G		
last	L. 3	F	A	G	R	
laŭ				A		R
laŭd	L. 3					
lav	L. 3					I
lecion	L. 3					
leg	L. 2	F	A	G	R	I
legom						I
lekant						I
leĝ			F	A	G	
leon	L. 4					I
lern	L. 2	F	A	G	R	I
leter	L. 3	F	A	G		I
lev	L. 4	F	A	G	R	
li	L. 2	F	A	G	R	
liber	L. 3		A		R	
libr	L. 2		A	G		I
lig						R
lign	L. 4	F	A			I
lingv	L. 3					R

lini			A					I
lit	L. 3		A					I
loĝ	L. 3		A		R			I
lok	L. 3	F	A	G	R			I
lokomotiv								I
long	L. 2	F	A	G	R			I
lorn								I
lud	L. 2	F	A	G				I
lum	L. 4		A	G				I
lun								I
lund	L. 3							I
lup								I
magazen								I
maj	L. 3							I
majest		F						I
majstr				G				I
malgraŭ	L. 4	F						I
man	L. 2	F	A	G	R			I
manĝ	L. 2	F	A	G				I
manik								I
mank				G				I
mantel								I
mar			A					I
mard								I
mark			A	G				I
marŝ		F						I
mart	L. 3							I
martel								I
mastr		F						I
maŝin								I
maten	L. 2	F	A					I
mejl			A					I
mem	L. 3	F	A	G	R			I
membr				G				I
memor	L. 4	F	A					I
merkred								I
merl								I
met	L. 3	F	A	G	R			I
metr	L. 3			G				I
mez	L. 3	F	A					I
mezur			A	G				I
mi	L. 2	F	A	G	R			I
mien								I
mil	L. 3	F	A	G	R			I
milit		F	A	G	R			I
min								I
minut								I
mir	L. 4							I
model				G				I
moment		F						I
mon	L. 3	F	A	G				I
monat	L. 3	F	A					I
mond	L. 4	F		G	R			I
mont	L. 4		A					I
montr	L. 3	F	A	G	R			I
morgaŭ	L. 3	F	A	G				I
mort	L. 3	F	A	G	R			I
motocikl								I
mov		F	A		R			I
mult	L. 2	F	A	G	R			I
mur	L. 3		A					I
mus								I
muŝ								I

muzik								I
naci							R	I
najl								I
najtingal								I
nask	L. 4		A				R	I
natur		F		G				I
naŭ	L. 3			G			R	I
naz	L. 3							I
ne	L. 2	F	A	G	R			I
neces	L. 3			G			R	I
neĝ	L. 4							I
nek	L. 3	F						I
nenia	L. 4	F	A	G				I
nenial	L. 4							I
neniam	L. 3	F	A	G				I
nenie	L. 4							I
neniel	L. 4							I
nenies	L. 4	F	A	G				I
nenio	L. 3	F	A	G	R			I
neniom	L. 4	F	A	G				I
neniu	L. 3	F	A	G				I
nerv		F						I
nev								I
ni	L. 2	F	A	G	R			I
nigr	L. 4	F	A					I
nokt	L. 3	F	A	G				I
nom	L. 2	F	A	G	R			I
nombr			A	G				I
nord			A					I
not								I
nov	L. 3	F	A	G	R			I
nu			A					I
nub								I
nuks								I
nun	L. 2	F	A	G	R			I
nur	L. 2	F	A	G	R			I
objekt		F						I
ofic								I
oft	L. 3	F	A	G	R			I
ok	L. 3			G				I
okaz	L. 3		A		R			I
okul	L. 3	F	A	G				I
okup		F						I
ol	L. 3	F	A	G	R			I
ombrel								I
oni	L. 2	F	A	G	R			I
onkl	L. 2	F						I
opini				G				I
or		F	A	G				I
orang				G				I
ord								I
ordon	L. 3	F	A					I
orel			A					I
organiz					R			I
orient			A					I
ort								I
ov	L. 3		A					I
pac				G	R			I
paf	L. 4	F						I
pag	L. 3		A	G				I
pag								I
pal	L. 3							I
pan	L. 2		A					I



.salt	L. 3	A							suker	L. 3									I
salut	L. 3								sun	L. 3	F	A	G						I
sam	L. 3	F	A	G	R				sup	L. 4									I
san	L. 2								super	L. 3	F	A	G						I
sankt		F							supre	L. 3	F	A	G						I
sap									sur	L. 3	F	A	G	R					I
sat	L. 3								šaf	L. 2	F	A	G						I
sav			A						šajn	L. 3	F	A			R				I
scen		F							šang		F	A							I
sci	L. 3	F	A	G	R				ši	L. 2	F	A	G						I
scienc									šip	L. 3		A							I
sciur									šlos										I
se	L. 3	F	A	G	R				šnur										I
sed	L. 2	F	A	G	R				špar										I
seĝ	L. 3								šrank			A							I
sekund			F	A	G	R			štat		F	A	G	R					I
sekv			A						štof				G						I
semajn	L. 3		A						šton	L. 3		A	G						I
sen	L. 3	F	A	G	R				štop										I
senc									štrump										I
send	L. 3	F	A	G	R				štup										I
sent	L. 3	F	A	G	R				šu										I
sep	L. 3	F			R				šuld				G						I
serĉ		F		G					tabl	L. 2	F	A							I
serpent									tabul										I
serur									taburet										I
serv	L. 3	F	A	G					tag	L. 2	F	A	G	R					I
ses	L. 3	F	A	G	R				tali										I
si	L. 3	F	A	G	R				tamen	L. 3	F		G	R					I
sid	L. 3	F	A	G	R				tapiŝ										I
signif			A						tas										I
silent	L. 3								tavol				G						I
silk									te										I
simi									tegment										I
simpl		F							tegol										I
sinjor	L. 2	F		G	R				teler										I
situ				G					tem		F								I
skatol									temp	L. 2	F	A	G	R					I
skrib	L. 2	F	A	G	R				ten	L. 3	F	A	G	R					I
soci				G					ter	L. 3	F	A	G	R					I
sol		F	A	G					tia	L. 4	F	A	G	R					I
soldat		F	A						tial	L. 3	F	A	G						I
somer	L. 3		A						tiam		F	A	G						I
son	L. 3		A						tie		F	A	G						I
sonor									tiel	L. 3	F	A	G	R					I
sorb									tigr		F	A	G						I
spec		F		G					tim	L. 3	F	A	G						I
spedul									tio	L. 2	F	A	G	R					I
spic									tiom	L. 3	F	A	G						I
spirit		F	A	G					tir	L. 4	F	A	G						I
spong									tiu	L. 2	F	A	G	R					I
stang									tol										I
star	L. 3		A	G	R				tond										I
stat		F	A	G					tra	L. 2		A	G						I
stel									traduk										I
strat	L. 3	F	A	G					tram										I
streĉ		F							tranĉ	L. 3		A		R					I
strig									trankvil	L. 3									I
sub	L. 3	F	A	G	R				trans	L. 4		A	G						I
substanc		F		G					tre	L. 2	F	A	G	R					I
sud			A						tri	L. 2	F	A	G	R					I
sufer				G					trikot										I
sufiĉ	L. 3	F	A	G	R				trink	L. 3	F	A							I



tritik					I	verk				G	
trotuar	L. 3	F	A	G		verm					I
trov	L. 3	F	A	G	R	vesper	L. 3	F		G	
tru						vest	L. 3		A		I
tub						vešt					I
tuj	L. 3	F		G		veter	L. 3	F			
tuk						vetur	L. 3			G	R
turn		F	A	G		vi	L. 2	F	A	G	R
tuŝ		F				viand	L. 4				I
tut	L. 2	F	A	G	R	vid	L. 2	F	A	G	R
ung						vilaĝ	L. 3	F			I
unu	L. 2	F	A	G	R	vin	L. 3				I
urb	L. 2	F	A	G	R	vintr	L. 3		A		
urs						viol					I
uz	L. 3		A	G		violon					I
vagon	L. 4		A			vir	L. 3	F	A	G	R
valid				G		viŝ					I
valor				G		vit					I
varm	L. 2		A			vitr					I
vaz						viv	L. 3	F	A	G	R
vek	L. 3					vizaĝ	L. 3				R
vel			A			vizit	L. 3		A		
ven	L. 2	F	A	G	R	voĉ		F	A	G	
vend	L. 3					voj	L. 3	F	A	G	R
vendred	L. 3					vojaĝ	L. 4				I
vent		F	A			vok		F	A	G	
ver	L. 3	F	A	G		vol	L. 2	F	A	G	R
verb						volont	L. 2	F	A	G	R
verdb						vort	L. 2	F	A	G	R
verd						vulp	L. 3	F	A	G	
						zorg					

### Afiksoj.

Afiksoj uzeblaj en testo 2-a, ĉar troviĝantaj en la plej multaj lernolibroj en la 5 unuaj partoj: m a l, i n.

Afiksoj uzeblaj en testo 3-a, ĉar troviĝantaj en la plej multaj lernolibroj en la 10 unuaj partoj: b o, e k, g e, a d, a n, a r, e b l, e c, e g, e j, e t, i g, e ĝ, i l, i s t, u j, u l.

Afiksoj uzeblaj en testo 4-a, ĉar troviĝantaj en la plej multaj lernolibroj en la 5 lastaj partoj: d i s, r e, a ĵ, e m, e r, e s t r, i d, i n d, i n g.

## Esperanto en la Lernejo.

El „Internacia Esperanto-Servo“.

En Aŭstrujo: La administra konsilantaro de Vieno decidis en unu el siaj lastaj kunsidoj la organizon de 24 novaj esp.-kursoj en la normal-lernejoj de la aŭstria ĉefurbo. — La fakultativa esp.-instruado estas enkondukita en la programon de la Instruista Seminario de Stöbersdorf.

En Francujo: La Urba Lernejo por Eksterlanda Komerco kaj Reprezentado en Parizo, kie Esperanto estas instruata kiel libervola fako, ĵus unuafoze organizis ekzamenojn por havigi la oficialan diplomon pri la studo de esperanto.

En Finnlando: Esperanto estas ĵus enkondukita en la 3 klasojn de la normal-liceo finlanda en Helsingfors (Helsinki), kie la instruistoj-studentoj de la instruista seminario devas doni siajn unuajn prov-lectionojn. La instruado estas deviga por la partoprenantoj de la kursoj.

En Italujo: La faŝista instrua instituto en Brescia enkondukis esperanton en sian programon. Oni atendas, ke tiun ĉi ekzemplon oni sekvos en aliaj urboj.

En Nederlando: La komerca instituto Schoevers en Hago enkondukis la instruadon de esperanto en sian programon kaj ĵus organizis plurajn kursojn por tiu ĉi lingvo.

## Angla Konferenco Instruista — Paskon 1928.

(Ekstrakto el ĵurnalo „The Daily Express“).

Eduku la voĉdonantaron — La junulinoj.

Parolante al la konferenco ĉe Cambridge s-ro W. W. Hill, prezidanto de N. U. T. — angla unuigo instruista — postulis grandan progresan movadon en edukado. Li diris, ke nur malgranda nombro da infanoj eniras liceon post la elementa lernejo; ke multaj lernejoj konstruaĵoj estas tiom malbonstataj, ke la infanaro suferas.

Ne nur estas edukado bezonata por la infano hodiaŭ. Estas eĉ pli bezonata por la komunumo, por doni ŝtatan firmecon. Donante la voĉdonon al la junularo, la lando fine venas sub kontrolon de la tuta plenaĝa enloĝantaro. Kelkaj personoj ŝajne estas timigataj pro eblaj rezultatoj de junulara voĉdono. Kialo por ilia timo estas la ŝajna frivoleco kaj gajeco de tiuj ĉi novaj junaj civitanoj.

„Mi konfesas, ke timo pro tia konsidero ŝajnas al mi ne rajtigita. Mi tute ne estas terurigata de ilia aspekto — iom kontraŭe. Kaj mi ja ne kredas, eĉ dum momento, ke virina kapableco, ekporti pli grandajn ŝarĝojn, malpliigis per lasta malpliigo de ilia vesta ŝarĝo.“

„Tio, kion mi timas, kaj kion ni ĉiuj devas timi, estas danĝero pro duone edukita voĉdonantaro. Ne la demokratio minacas, sed la nescio.“

Lernejo estu rigardata kiel ilo de nacia savo. Ĝi estu uzata, ŝirmi estontajn civitanojn naciajn kontraŭ danĝeroj, kiuj stariĝos antaŭ ili dum farado de civitanaĵo devoj kaj rajtoj. Plej insida el tiuj ĉi danĝeroj estas la minaco de homamasa psikologio.“

„Tiu ĉi danĝero kutimis rilati al homamasa oratoro. Ĝi nuntempe alprenas formon de amasa maŝinaro. Mi celas la menanikan kaj centrigitan karakteron de kinematografio, radio kaj eble, estonte, la gazetaro. Oni prezentas samajn filmojn, ne nur en ĉiu urbo en lando, sed en ĉiu lando de l' mondo. Ĉiunokte al la vidantaj mondanoj filmestro de Hollywood prezentas dramojn kaj komediojn kaj traktas sian interpreton de l' vivo per analfabetaj rubrikoj kaj kunigata dolĉeco de longedaŭra kisado.“

„Simila centriga tendenco montriĝas en la taga gazetaro. Iom post iom la gazetaro iĝas kontrolata de malgranda nombro de estroj.“

„Kiam ni nin turnas al radio, ni eltrovas, ke monopola kontrolo estas fakto, ke arta kaj intelekta kulturo jam estas, tiuflanke, centrigita kaj normigita. Eble tempo alvenos, kiam areto da homoj difinos tion, kion ni legos sidante sur niaj brakseĝoj, kaj kion ni aŭskultos ĉe niaj fajrejoj. Homamasa psikologio, estonte, kreskos ne ĉe stratangulo, sed ĉe fajrejo.“

Kontraŭ tia superigo de l' homamaso kaj subpremo de l' individuo la instruistaro firme deklaras batalon.

K. Hancock.

## **TAGE-kunveno en Antverpeno.**

London, la 6-an de Aŭgusto, je la 15-a, en ĉambro de la Supera Komerca Instituto, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE) havos fakunvenon kun jena tagordo:

1. Raporto pri TAGE kaj IPR.
2. Kunlaboro de TAGE en la pedagogia movado:  
Internacia Oficejo de Edukado,  
Internacia Laborrondo por Nova Edukado,  
Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj,  
Internacio de Eduklaboristoj,  
Mondfederacio de Instruistaj Asocioj.
3. Esperanto kaj Reformo de la Historiinstruo.
4. Kunlaboro de TAGE en UEA kaj SAT.
5. Fondo de landaj unuiĝoj de Esperanto-instruistoj, filioj de TAGE.

Krom tio estas projektita Esperanto-leciono kun infanoj.

## **Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE).**

La asocio de la organizita Esperanto-instruistaro moviĝas sur altiganta linio: En la jaro post la fondo de TAGE, 1925, Internacia Pedagogia Revuo havis 507 abonantojn, 1926: 511, 1927: 630, 1928: 700.

Ĉar ankoraŭ estas kelkaj monatoj ĝis jarfino, ni certe superos fine de 1928 la nombron de 750 abonantoj. Inter la membraro troviĝas influicaj kaj eminentaj personoj. Pro la gravaj taskoj, kiujn devas plenumi TAGE en la propagando de Esperanto en Lernejo kaj Instruistaro, tiu kresko estas tre efika kaj necesa.

Unu fakto el la agado de TAGE meritas la specialan atenton de la Esperantistaro:

Paskon 1928 la Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj (kiu havas membraron de 500 000 instruistoj) havis internacian konferencon en Berlin: TAGE sendis al ĉiuj membroj de la Estrarkomitato en 11 nacilingvaj tekstoj detale motivigitan proponon pri akcepto de Esperanto. La sukceso estis, ke la konferenco, laŭ propono de Bjerke-Svedujo, unuanime decidis, komisiu al ĉiuj aliĝintaj asocioj la esploron de la helplingva problemo (rig. raporton en n-ro 6/7 de IPR!).

El tiu decido rezultigas gravaj taskoj por ni Esperanto-instruistoj.

Krom tio multaj aliaj taskoj atendas, ĝis la organizita Esperanto-instruistaro ekprenos ilin. Rememoru, ke en somero 1929 okazos en Kopenhago la 5-a kongreso de la Internacia Laborrondo por Nova Edukado, dum kiu unufoje estos aplikata ankaŭ Esperanto.

Same en 1929 okazos en Ĝenevo grava pedagogia kongreso de Mondfederacio de Instruistaj Asocioj (San Francisko), kiu ankaŭ diskutos pri Esperanto.

Ni estu maldormaj en tiu situacio.

Helpu fortigi TAGE al konsiderinda asocio, abonante ĝian organon Internacia Pedagogia Revuo (jarabono 3 gm).

TAGE bezonas la subtenon de ĉiu Esperanto-instruisto.

**Administrejo: M. Goldberg, Leipzig S 3, Frohburgerstr. 68 p.**

# **SENNACIECA**

## **REVUO**

monata organo de  
Sennacieca Asocio Tutmonda

Literaturo, Scienco, Pedagogio

Ĉi tiu revuo aperigas en ĉiu jarkolekto  
4 numerojn tute dediĉitajn al  
Pedagogiaj Temoj

Abonprezo: 4 germ. mark. jare

Petu specimenon ĉe la administranto

**R. LERCHNER**

Colmstr. 1, Leipzig O 27

# **SEMAJNE**

aperas la aktuala, ilustrita  
neŭtrala ĵurnalo de la  
Esperanto-movado en  
granda, tagĵurnala  
formato:

## **HEROLDO DE ESPERANTO**

kun riĉa

diversspeca enhavo  
ekskluzive en Esperanto.  
Kunlaborantoj en 40 lan-  
doj. Petu tuj senpagan  
specimon de la Administrado

**HEROLDO DE ESPERANTO  
HORREM B. KÖLN, GERM.**

## **La plej malkara**

gazeto esperantista estas  
sendube VERDA STELO,  
kiu aperas ĉiumonate en  
granda ĵurnala formato,  
dukolora presita, kun propa-  
ganda teksto en kvar  
lingvoj, la cetera teksto nur  
en Esperanto. Jarabono  
nur 2,50 sv. fk. aŭ egal-  
valoro. Kolektiva jarabono  
(minimume 5 abonoj al sa-  
ma adreso) 2 fk. ĝis 1.20  
fk. Specimeno tute sen-  
page de la Administracio

**VERDA STELO,**  
Horrem bei Köln (Germ.)

## **3200 Esperanto - Instruistoj**

ricevis propagandnumeron 4/5, 1928 de

## **Internacia Pedagogia Revuo**

### **3200 Esperanto-Instruistoj**

organizigu en TAGE, abonante  
IPR, por sukcesigi Esperanton en

### **Lernejo kaj Instruistaro**

## **Propagando.**

*Se vi konas Esperanto-  
instruiston, kiu ne jam  
legas Int. Ped. Rev. bon-  
volu sciigi ties adreson  
al la administrejo.*